

William Blake,

Der Tiger

tradukita de Walter A. Aue

Argiope-informo:

La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.

Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

William Blake,

La tigro

tradukita de William Auld

Tigro, tigro, brile brula
 En arbaro nokt-obskura,
 Forĝis kia man' eterna
 Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
 Ardis via okulhelo?
 Kia lin flugil' subtenis?
 Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno.
 Por vi tordiĝis kortendeno?
 Kaj kiam pulsas batoj koraj,
 Kiaj pied' kaj mano glora?

Kia martelo? Ĉeno kia?
 Kia forn' por cerbo via?
 Riskis kia fort' kolosa
 Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis
 Kaj sur la ĉielon larmis,
 Ĉu la verko al li karis?
 Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

...

Tigro, tigro, brile brula
 En arbaro nokt-obskura,
 Forĝus kia man' eterna
 Vin je simetri' konsterna?

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 – †1827-08-12) en la Germanan de Walter A. Aue.*

Arg-1048-2126 (2014-06-08 19:55:12)

Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en <http://myweb.dal.ca/waue/Trans/Blake-Tiger.html>.

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de WILLIAM BLAKE (*1757-11-28 – †1827-08-12) en Esperanton de WILLIAM AULD (*1924-11-06 – †2006-09-11).*

Arg-1048-2127 (2014-06-08 19:35:19)

Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html>.